Per la esprimoj (1; 14, 16, 17, resp. 19) estas plene solvita la problemo pri eltrovado de pozicioj (efemeridoj) en ajna momento t , senpere el la donitaj pozicio kaj rapido en certa momento t_0 , sen bezono ke la tempo $t - t_0 = \tau$ eniru en la koeficientoj η , ζ . La funkcioj $c_1(\alpha)$, c_2 , c_3 , estas ĉiam realaj, senkonsidere ĉu α estas reala aŭ ne, resp. ĉu $\zeta > 1$ aŭ $\zeta < 1$. Tio ja signifas ke la ekvacio (1, 14) havas ĉiam almenaŭ unu (kaj fakte ĵus unu) realan solvon.


Kiam $t_0 = T$, t.e. kiam oni ekiras ĵus de la perihelia pozicio, ni havas $\eta = 0$, $\zeta = e$, kaj la ekvacio (1, 14) prenas la formon

$$(1, 20) \quad y + e y^3 c_3(y/\sqrt{1-e}) = \varepsilon = \frac{t-T}{r/\bar{r}}.$$

Se ni skribas ĝin en la formo

$$(1, 21) \quad y = \frac{\varepsilon}{1 + e y^2 c_3}$$

ni povas ankaŭ grafike prezenti la ligon inter y kaj ε .



Bdo 1

Por $e=0$ ni havas la rektan linion $y=\varepsilon$, kaj por ĉiu $e \neq 0$ du centre simetriajn branĉojn. Unu tia bone fartita diagramo povas bonege servi por grafika eltrovado de y , tre rapide kaj serie, ĉar oni bezonos nur tralegi la egaldistancajn ordinatojn de unu el la kurboj.

Esence nenio ŝanĝiĝas ankaŭ por neperihelia ekira pozicio, t.e. kiam ni pritraktas la ekvacion (1, 14) anstataŭ (1, 20). Por negrandaj ε ni vidas el la formo

$$(1, 22) \quad y = \frac{1}{1 + \zeta y^2 c_3 + \eta y c_2}$$

ke ĉiuj kurboj trapasas same la koordinatan centron kaj nemulte diversas de la supraj kurboj, ĉar

$\eta = \frac{rv}{\sqrt{r}}$ neniam povas esti granda (nome por para-

bola kaj hiperbola moviĝo la ekira pozicio ne povas esti malproksima de la perihelio, t.e. la tanĝanto estas preskaŭ orta kun la radiuso).

Kaj por pli grandaj ε oni povas skribi ĝin en la formo

$$y = \frac{\varepsilon - \eta y^2 c_2}{1 + \zeta y^2 c_3};$$

oni ja vidas ke ankaŭ tiam la kvantoj y nemulte (relative) diferencas de la kvantoj el la supra diagramo (sur kiu oni devas nur signi ζ anstataŭ e).

Ankaŭ per la unua derivado oni povas kontroli ke la kurboformo estas esence la sama. El

$$y + \eta \cdot \frac{1 - \cos \alpha}{1 - \zeta} + \frac{\zeta}{1 - \zeta} \frac{\alpha - \sin \alpha}{\sqrt{1 - \zeta}} = \varepsilon$$

oni trovas

$$\frac{dy}{d\varepsilon} \left[1 + \frac{\eta}{1 - \zeta} \sin \alpha \cdot \sqrt{1 - \zeta} + \frac{\zeta(1 - \cos \alpha)}{1 - \zeta} \right] = 1$$

$$(1, 23) \quad \frac{dy}{d\varepsilon} (1 + \eta y c_1 + \zeta y^2 c_2) = 1.$$

Ni tuj vidas ke oni ne havas ekstremajn punktojn, ĉar la derivado povas ŝanĝi la signon nur se

$$1 + \eta y c_1 + \zeta y^2 c_2 = 0$$

$$1 + \frac{\eta}{\sqrt{1 - \zeta}} \sin \alpha + \frac{\zeta}{1 - \zeta} (1 - \cos \alpha) = 0$$

$$1 - \zeta + \sqrt{1 - \zeta} \frac{e \sin u_0}{\sqrt{1 - \zeta}} \sin \alpha + \zeta - \zeta \cos \alpha = 0$$

$$1 - e \cos(\alpha + u_0) = 1 - \cos u = \frac{r_t}{a} = 0.$$

Ĉi tio estas evidente neebla kaj la derivado restas konstante pozitiva — la kurbo konstante supreniras, kiel en la supra (perihelia) kazo. La rezonado estas neaplikebla nur en parabola moviĝo, t.e. kiam $\zeta = 1$. Sed tiam

$$\frac{dy}{d\varepsilon} (1 + \eta y + \frac{y'}{2}) = 1$$

kaj la kvadrata trinomo evidente ne ŝanĝas la signon, ĉar $\eta^2 - 2 < 0$.

Fakte ni povas (1, 23) skribi en la formo

$$(1, 24) \quad \frac{dy}{d\varepsilon} \cdot \frac{r_t}{a(1 - \zeta)} = 1, \quad \frac{dy}{d\varepsilon} = \frac{r}{r_t},$$

kiu formo havas sencon por ĉiuspecaj moviĝoj. El ĝi oni vidas ke y kreskas kun ε kaj $\rightarrow \pm \infty$ kiam $\varepsilon \rightarrow \pm \infty$. Ĉee la tanĝanto en senlimo paralelas kun la abacisa akso en kazo de parabola aŭ hiperbola moviĝo, do tiam ε kreskas tre malrapide.

Oni povas utiligi (1, 24), resp. (1, 23), por rapida korekto de y pro negrandaj ŝanĝoj de ε , ĉar tiam oni havas

$$(1,25) \quad \Delta y = \frac{\Delta \varepsilon}{1 + \eta y c_1 + \zeta y^2 c_2},$$

speciale por perihelia ekira pozicio

$$(1,25') \quad \Delta y = \frac{\Delta \varepsilon}{1 + e y^2 c_2}.$$

Eĉ oni povas por nelongaj intervaloj kalkuli regule la efemeridon por iu meza momento kaj poste nur aldonadi la korektaĵojn ambaŭflanke (kvankam tiaj procedoj estas de negranda intereso plu—pro la tre evoluita kalkultekniko).

En la supraj esprimoj preskaŭ ĉiam aperas kune $y c_1$, $y^2 c_2$, $y^3 c_3$, kaj ni povas enkonduki la signaĵojn

$$(1,26) \quad m = y c_1(\alpha) = \frac{\sin \alpha}{\sqrt{1-\zeta}}, \quad p = y^2 c_2(\alpha) = \frac{1 - \cos \alpha}{1 - \zeta},$$

$$q = y^3 c_3(\alpha) = \frac{\alpha - \sin \alpha}{(\sqrt{1-\zeta})^3}.$$

Kun ili, la formuloj (1,14), (1,16), (1,17), (1,19) fariĝas

$$(1,27) \quad y + \eta p + \zeta q = \varepsilon,$$

$$(1,28) \quad f = 1 - p, \quad g = r/\bar{r}(\varepsilon - q) = \\ = (t - t_0) - q \cdot r/\bar{r} = r/\bar{r}(m + \eta p),$$

kaj (1,23) donas

$$(1,29) \quad \frac{dy}{d\varepsilon} = \frac{1}{1 + \eta m + \zeta p}.$$

2) Kazo de parabolo kaj de hiperbolo

Por parabola moviĝo ĉio, kiel same ĉe Stumpff, simpliĝas, ĉar $\zeta = 1$, $\alpha = 0$, $c_2 = \frac{1}{2}$, $c_3 = \frac{1}{6}$, kaj por kalkuli f , g , oni havas

$$(2,1) \quad y + \frac{\eta}{2} y^2 + \frac{1}{6} y^3 = \varepsilon,$$

$$(2,2) \quad f = 1 - \frac{1}{2} y^2,$$

$$g = r/\bar{r}(\varepsilon - \frac{1}{6} y^3) = (t - t_0) - \frac{r}{6\bar{r}} y^3.$$

La efemeridojn oni povas kalkuli ĉu solvinte unue la ekvacion (2,1) ĉu skribinte ĉion kiel la fermita formularo

$$(2,3) \quad y = \frac{g}{r/\bar{r}} - \eta(1-f), \quad 1-f = \frac{1}{2} y^2,$$

$$\frac{g}{r/\bar{r}} = \varepsilon - \frac{1}{6} y^3.$$


La fermita formularo donus, per sinsekvaj alproksimiĝoj, ne nur y , sed tuj ankaŭ f , g . Malfacilaĵo aperas ĉe elekto de konvena unua valoro por unu

de la nekonatoj. Sed ankaŭ por solvado de la ekvacio (2,1), pli bone en la formo

$$y = \frac{\varepsilon - \eta \cdot \frac{1}{2} y^2}{1 + \frac{1}{6} y^2},$$

ni bezonas unuan ekiran valoron por y . Ĉar y estas malgranda, oni povas fari diagramon de la funkcio

$$(2,4) \quad \varepsilon = y \left(1 + \frac{1}{6} y^2\right)$$



Bdo 2

kaj el ĝi simple traŝlegadi la unuan proksimuman valoron (aparte por ĉiu ε). Oni eĉ povas apud ĉi tiu kurbo, koresponda al $\eta = 0$, desegni ankoraŭ kelkajn proksimajn kurbojn (ekz. por $\eta = \pm 0,1$, $\eta = \pm 0,2$ ktp.). El ili ni traŝlegadus iom pli precizajn valorojn por y . Aŭ ni povas plene utiligadi la diagramon (2,4), sed en ĝi traŝlegi la valoron y por $\varepsilon + 3\eta$ (anstataŭ por ε) kaj tiam depreni 3η , ĉar (2,1) povas havi ankaŭ la formon

$$(2,5) \quad y + 3\eta = \frac{\varepsilon + 3\eta}{1 + \frac{1}{6} y^2}.$$


Por hiperbola moviĝo la supra metodo estas nepraktika kiam oni havas kalkuli efemeridojn de malproksimaj pozicioj, ĉar la funkcioj c_1 , c_2 , c_3 , kondukas iom alimaniere por nereaj argumentoj, nome por grandaj $t - t_0$ ili prenas senlimajn valorojn (kvankam ili restas realaj kaj pozitivaj ankaŭ ĉe hiperbolo). Pri ĉi tio oni facile konvinkiĝas kiam unue oni konstatas el la Keplera ekvacio ke u estas pure nereala kvanto en hiperbola kazo, do ankaŭ $\alpha = u - u_0$. Post tio oni vidas ke $u \rightarrow \infty$ (laŭlonge de nereala akso) kiam $t \rightarrow \infty$.

La lastan aserton oni pravas per enkonduko de eks ($-ui$) = s , pro kio la Keplera ekvacio fariĝas

$$\ln s + e \cdot \frac{1-s^2}{2s} = -Mi, \quad M = \frac{t-t_0}{a/\bar{a}},$$

$$2s(\ln s + Mi) = e(s^2 - 1).$$

Grafikigo de la maldekstra kaj de la dekstra funkcio montras ke por $Mi < 0$ la kurboj tranĉas unu la alian en iu $s < 1$, sed por $Mi > 0$ ili tranĉiĝas en



Bdo 3

iu $s > 1$. Kiam Mi kreskas la parabolo ne ŝanĝiĝas kaj la alia kurbo tranĉas ĝin aŭ ĉiam pli proksime al la koordinata centro (t. e. $s \rightarrow \infty$), aŭ ĉiam pli proksime al la senlimo ($s \rightarrow 0$). En ambaŭ okazoj, pro la farita substituo $-ui = lns$, oni vidas ke ui fariĝas senlima.

La samo okazas kun kiu ajn funkcio c_1, c_2, c_3 ekz.

$$c_3 = \frac{1}{\alpha^2} \frac{\text{eks}(\alpha i) - \text{eks}(-\alpha i)}{2\alpha^3 i}.$$

Unu el la esprimoj $\text{eks}(\alpha i)$, $\text{eks}(-\alpha i)$, kreskas pli rapide ol $\alpha^3 i$ kaj $\rightarrow +\infty$ kiam $\alpha i \rightarrow \infty$, do la funkcio prenas tre grandan valoron por granda i .

Pro ĉio tio la solvado de la ekvacio (1,14) por grandaj i , en la hiperbola kazo, ne povas esti per sinsekvaj alproksimiĝoj, kaj pro la sama kaŭzo tio ne povas esti ankaŭ kun la ekvacio (1,4). Ne utilas tiucele same la fermita formularo

$$(2,6) \begin{cases} 1-f=p, & \frac{g}{r\sqrt{r}} = m + \eta p - \varepsilon - q, \\ y = \varepsilon(1-\zeta) + \zeta \cdot \frac{g}{r\sqrt{r}} - \eta p = \varepsilon - \eta p - \zeta q. \end{cases}$$

La formularo estas tre praktika nur ŝajne, sed por neniu el la kvantoj f, g, y , oni povas trovi konvenan ekiran valoron, tian ke la procedo konverĝu. Tial ni bezonas alian procedon por eltrovado de f, g .

Ni trovos ĝin per tia integrado en kiu tute ne aperos nereaj kvantoj. Integrado de la ekvacio

$$(2,7) \quad c^2 - \mathbf{r}^2 \mathbf{v}^2 - (\mathbf{r}\mathbf{v})^2 = r^2 \left(\frac{2}{r} - \frac{1}{a} \right) - r^2 \left(\frac{dr}{dt} \right)^2,$$

aŭ en la klasika formo

$$r^2 \frac{d\theta}{dt} = c, \quad r = \frac{c^2}{1 + e \cos \theta},$$

iras laŭ du tute diversaj vojoj (se ni deziras resti

en la realo), laŭ tio ĉu $\frac{1+e}{1-e}$ estas pozitiva aŭ negativa.

Ne enirante la konatajn detalojn de la integrado, donu al la trovita integralo por hiperbola kazo (kie $e > 1$) formon konvenan por kalkulado de f, g . En la ekvacio (2,7) enkonduku w per la substituo

$$(2,8) \quad r = \frac{-a(e - \cos w)}{\cos w}$$

kaj ĝi fariĝas

$$\frac{(e - \cos w)dw}{\cos^2 w} = \frac{dt}{-a\sqrt{-a}};$$

ĝia integralo donas

$$(2,9) \quad c(\lg w - \lg w_0) = \frac{t - t_0}{-a\sqrt{-a}} \ln \frac{(1 - \sin w) \cos w_0}{(1 - \sin w_0) \cos w}.$$

Inter ĉi tiu, hiperbola, anomalio w kaj la vera anomalio θ ekzistas ligaĵo

$$(2,10) \quad \lg \frac{\theta}{2} = \sqrt{\frac{e+1}{e-1}} \lg \frac{w}{2}$$

aŭ

$$(2,11) \quad \sin \theta = \frac{\sqrt{e^2 - 1} \sin w}{e - \cos w}, \quad \cos \theta = \frac{e \cos w - 1}{e - \cos w}$$

Kaj la komencan valoron w_0 ni havos el

$$\cos \theta_0 = \frac{c^2 - r}{re}, \quad \sin \theta_0 = \frac{c(\mathbf{r}\mathbf{v})}{ac},$$

kio donas

$$(2,12) \quad e \lg w_0 = \frac{(\mathbf{r}\mathbf{v})}{\sqrt{-a}}, \quad \cos w_0 = \frac{-ae}{r_0 - a},$$

ĉe kio

$$(2,13) \quad e^2 - 1 = \frac{c^2}{-a}, \quad \frac{1}{-a} = v^2 - \frac{2}{r}.$$

Evidente ĉio restas reala, ĉar la esprimo sub logaritmo estas pozitiva

$$(r > 0, \text{ do } \cos w > 0, -\frac{\pi}{2} < w < \frac{\pi}{2}).$$

Por trovi f kaj g ekiru de la identaĵo

$$c^2 \mathbf{r}_t = [\mathbf{c}[\mathbf{r}, \mathbf{c}]] = [[\mathbf{r}\mathbf{v}][\mathbf{r}, \mathbf{c}]] = (\mathbf{r}\mathbf{r}_t \mathbf{c})\mathbf{v} - (\mathbf{v}\mathbf{r}_t \mathbf{c})\mathbf{r},$$

kio donas

$$(2,14) \quad (\mathbf{r}_t \mathbf{v}\mathbf{c}) = c^2 f, \quad c^2 g = (\mathbf{r}\mathbf{r}_t [\mathbf{c}\mathbf{r}]) = r_t c r \sin(\theta - \theta_0),$$

do

$$(2,15) \quad g = \frac{cr \sin(\theta - \theta_0)}{1 + e \cos \theta}.$$

Plue el la Laplace-Hamilton-a integralo

$$[\mathbf{v}, \mathbf{c}] - \frac{\mathbf{r}_t}{r_t} = c = [\mathbf{v}\mathbf{c}] - \frac{\mathbf{r}}{r},$$

utiligante (2,4) kaj multiplikante skalare per $\mathbf{r}_r$ ni ricevas

$$c^2 - r_r = c^2 f - \frac{(\mathbf{r}_r, \mathbf{r})}{r}$$

$$c^2(1-f) = \frac{1}{r} (\mathbf{r} \mathbf{r}_r - \mathbf{r} \mathbf{r}_r) = r_r (1 - \cos(\theta - \theta_0))$$

$$(2,16) \quad 1-f = \frac{1 - \cos(\theta - \theta_0)}{1 + e \cos \theta}$$

Ni devas ankoraŭ en la esprimoj (2,15) kaj (2,16) anstataŭi θ per w utiligante (2,11). La ŝanĝo donas

$$1-f = \frac{c^2 - 1 - \cos w \cos w_0 (e^2 - 1) - (e^2 - 1) \sin w \sin w_0}{(e^2 - 1) \cos w (e - \cos w_0)}$$

$$= \frac{1 - \cos(w - w_0)}{\cos w \cdot r \cos w_0} (-a).$$

Al ĉi tiu esprimo oni povas doni la konvenajn formojn

$$(2,17) \quad 1-f = \frac{\zeta \sec w}{e(\zeta - 1)} (1 - \cos(w - w_0)),$$

$$\zeta = \frac{e}{\cos w_0} = r v^2 - 1 = 1 - \frac{r}{a},$$

$$(2,18) \quad 1-f = \frac{\zeta \sec w}{e(\zeta - 1)} + \frac{a}{r} (1 + \operatorname{tg} w \operatorname{tg} w_0).$$

Samvoje (2,15) fariĝas

$$g = \frac{r \sqrt{e^2 - 1} (e \sin w \cos w_0 - \sin w - e \cos w \sin w_0 + \sin w_0)}{(e^2 - 1) \cos w (e - \cos w_0)}$$

$$= \frac{r \sqrt{-a} [e \sin(w - w_0) - (\sin w - \sin w_0)]}{r \cos w \cos w_0} (-a).$$

Sed

$$\sin w - \sin w_0 = \sin(w - w_0) \cos w_0 - [1 - \cos(w - w_0)] \sin w_0$$

kaj pro (2,17) ni havos pluen

$$\frac{g}{-a \sqrt{-a}} = \frac{e \sin(w - w_0)}{\cos w \cos w_0} - \frac{\sin(w - w_0)}{\cos w} + \operatorname{tg} w_0 \cdot \frac{e(\zeta - 1)}{\zeta} (1-f).$$

Konsiderante (2,8) kaj $\zeta = \frac{e}{\cos w_0}$, ĉi tio fariĝas

$$(2,19) \quad \frac{g}{r \sqrt{-a}} = \frac{\sin(w - w_0)}{\cos w} + \sin w_0 (1-f) = \cos w_0 \operatorname{tg} w - f \sin w_0.$$

Estas tute nature preni por la variablo

$$(2,20) \quad z = \operatorname{tg} w,$$

kiu prenas la valorojn de $-\infty$ ĝis $+\infty$ dum w ŝanĝiĝas de $-\frac{1}{2}\pi$ ĝis $+\frac{1}{2}\pi$. Tiam por eltrovo de z, f, g , ni havos — de (2,9), (2,18), (2,19) — egalajojn

$$(2,21) \quad z = h_0 + \frac{1}{e} \frac{t - t_0}{a \sqrt{-a}} + \frac{1}{e} \ln(\sqrt{1 + z^2} - z),$$

$$h_0 = z_0 - \frac{1}{e} \ln(\sqrt{1 + z_0^2} - z_0),$$

$$(2,22) \quad 1-f = \frac{\zeta \sqrt{1 + \zeta^2}}{(\zeta - 1)e} + \frac{a}{r} (1 + z z_0),$$

$$g = \frac{r \sqrt{-a}}{\zeta} e (z - f z_0), \quad z_0 = \frac{(\mathbf{r} \mathbf{v})}{e \sqrt{-a}}.$$

El (2,21) oni povas trovi z per sinsekvaj alproksimiĝoj. Ili konverĝos ĉar la derivivo de la dekstra flanko

$$\frac{1}{e} \frac{1}{\sqrt{1 + z^2} - z} \left(\frac{1}{\sqrt{1 + z^2}} - 1 \right) = - \frac{1}{e \sqrt{1 + z^2}}$$

estas tre malgranda por grandaj z (resp. por grandaj t). Post tio (2,22) tuj donas f kaj g .

La donita procedo konvenas por aŭtomata maŝina kalkulado. Se oni kalkulas ankaŭ kun trigonometriaj tabeloj, pli konvenas aliformigi la esprimojn je $(w - w_0)$. Tiam estas pli bone preni (2,17) kaj (2,19)

$$1-f = \frac{1}{e - \cos w_0} \cdot \frac{1 - \cos(w - w_0)}{\cos w}$$

$$\frac{g}{r \sqrt{-a}} = \frac{\sin(w - w_0)}{\cos w} + \sin w_0 (1-f)$$

Por eltrovo de w ni utiligus (2,9) en la formo

$$e \operatorname{tg} w = e \operatorname{tg} w_0 - \ln(\sec w_0 - e \operatorname{tg} w_0) + \frac{t - t_0}{-a \sqrt{-a}} + \ln(\sec w - e \operatorname{tg} w)$$

$$e \operatorname{tg} w_0 = \frac{(\mathbf{r} \mathbf{v})}{\sqrt{-a}},$$

$$e \sec w_0 = \zeta = r v^2 - 1, \quad \frac{1}{-a} = \frac{\zeta - 1}{r}.$$

3) La procedo por elipsa moviĝo

Por elipsa kazo estas aplikeblaj la ĝenerala „fundamenta ekvacio“ kaj ĝia modifo (1,14), sed tio estas tute senbezona kiam oni pli simple solvas la taskon per la Keplera ekvacio. La sola bezono ĉi tie (por senpera utiligo de $\mathbf{r}, \mathbf{v}$) konsistas en ioma modifo de la Keplera ekvacio kaj de la esprimoj por f, g , tiel ke en ili oni kalkulu kun $u - u_0$. Evidente

$$(3,1) \quad u - u_0 = \frac{t - t_0}{a \sqrt{a}} + e \sin(u - u_0) \cos u_0 - e \sin u_0 [1 - \cos(u - u_0)]$$

Sed konsiderante (1,16) kaj (1,19), nun en la formo

$$(3,2) \quad 1-f = \frac{1 - \cos(u - u_0)}{1 - \zeta}$$

$$(3,3) \quad \frac{g}{r \sqrt{r}} = \frac{\sin(u - u_0)}{\sqrt{1 - \zeta}} + \eta (1-f),$$

kie — pro (1,11) kaj (1,13) —

$$\zeta = e \cdot \cos u_0 = rv^2 - 1 = 1 - \frac{r}{a},$$

$$\eta = \frac{e \sin u_0}{\sqrt{1 - \zeta}} = \frac{(rv)}{\sqrt{r}},$$

al la dekstraflanka esprimo (3,1) ni povas doni la formon

$$\begin{aligned} \frac{t - t_0}{a\sqrt{a}} + \zeta \left[\frac{g}{r\sqrt{a}} - \eta \sqrt{1 - \zeta} (1 - f) \right] - \\ - \eta \sqrt{1 - \zeta} (1 - \zeta) (1 - f) = \frac{t - t_0}{a\sqrt{a}} + \zeta \frac{g}{r\sqrt{a}} - \\ - \eta \sqrt{1 - \zeta} (1 - f). \end{aligned}$$

Signu ankoraŭ, pro malplilonga skribo,

$$(3,4) \quad \eta_1 = \eta \sqrt{1 - \zeta}, \quad g_1 = \frac{g}{r\sqrt{a}}, \quad f_1 = (1 - f) (1 - \zeta)$$

kaj ni havas la fermitan formularon

$$(3,5) \quad \begin{cases} f_1 = 1 - \cos(u - u_0), \quad g_1 = \sin(u - u_0) + \eta_1 f_1, \\ u - u_0 = \frac{t - t_0}{a\sqrt{a}} + \zeta g_1 - \eta_1 f_1. \end{cases}$$

En la elipsa kazo estas ζ kaj η_1 etaj kvantoj, dro kio en la unua alproksimiĝo oni prenas

$$u - u_0 = \frac{t - t_0}{a\sqrt{a}}, \quad a = \frac{r}{1 - \zeta},$$

oni tiam trovas f_1, g_1 , denove $u - u_0$ ktp. La procedo estas kaj praktika kaj konverĝa (des pli ju pli malgrandaj estas η_1, ζ), kaj ĉion oni povas efektivigi rigardante (r, v) kiel elemento-sistemon de la koncerna elipso. Tio ja estas pli simpla ol, pro ĝeneraleco, aplikadi la „ĝeneralan ekvacion“. Se al iu pli konvenas, oni povas unue trovi $(u - u_0)$ el (3,1) t.e. el

$$(3,6) \quad \begin{aligned} u - u_0 = \frac{t - t_0}{a\sqrt{a}} + \zeta \sin(u - u_0) - \\ - \eta_1 [1 - \cos(u - u_0)], \end{aligned}$$

kio precipe konvenas por proksimaj pozicioj, ĉar tiam $\sin(u - u_0)$, $1 - \cos(u - u_0)$ estas same etaj kvantoj kaj la procedo rapide konverĝas.

Per ĉi tio estas plene ebligita eltrovado de efemeridoj por ajna (proksima aŭ malproksima) momento, surbaze de trovitaj nur (r, v) , ĉar ĉi tie la esprimoj por f, g dependas de nenioj aliaj elementoj.

En la verkaĵo [5] estas donita ebleco por kalkulado de f, g per ilia seriigo laŭ la gradoj de η, ζ .

La koeficientoj apud η, ζ estis tie donitaj kiel serioj

kun gradoj de $\varepsilon = \frac{t - t_0}{r\sqrt{r}}$ (estas donitaj nur kelkaj

unuaj membroj en la serioj, kun ebleco kalkuli ankaŭ aliajn). Sed la koeficientojn oni povas havi ankaŭ kiel eksplicaj funkcioj de ε , danke al la ĉi tie trovitaj esprimoj por f, g .

Tiucele la formularon (3,5), utiligante gro malpli longa skribo ankaŭ la jam uzitan sinon $\alpha = u - u_0$, ni skribu en la formo

$$\alpha = M + \zeta \sin \alpha - \eta (1 - \cos \alpha), \quad M = \frac{t - t_0}{a\sqrt{a}},$$

$$(1 - \zeta) f = \cos \alpha - \zeta, \quad g_1 = \sin \alpha + \eta (1 - \cos \alpha),$$

kie estas denove prenita η anstataŭ η_1 . Popaŝa derivigo donas unue

$$h \frac{\partial \alpha}{\partial \eta} = -1 + \cos \alpha, \quad h \frac{\partial \alpha}{\partial \zeta} = \sin \alpha,$$

$$h = 1 + \eta \sin \alpha - \zeta \cos \alpha,$$

$$h \frac{\partial^2 \alpha}{\partial \eta^2} = - \left(\frac{\partial h}{\partial \eta} + \sin \alpha \right) \frac{\partial \alpha}{\partial \eta} \quad \frac{\partial h}{\partial \eta} = \sin \alpha + h_1 \frac{\partial \alpha}{\partial \eta}$$

$$h \frac{\partial^2 \alpha}{\partial \eta \partial \zeta} = - \sin \alpha \frac{\partial \alpha}{\partial \zeta} - \frac{\partial h}{\partial \zeta} \frac{\partial \alpha}{\partial \eta} \quad \frac{\partial h}{\partial \zeta} = - \cos \alpha + h_1 \frac{\partial \alpha}{\partial \zeta}$$

$$h \frac{\partial^2 \alpha}{\partial \zeta^2} = - \left(\frac{\partial h}{\partial \zeta} - \cos \alpha \right) \frac{\partial \alpha}{\partial \zeta} \quad h_1 = \eta \cos \alpha + \zeta \sin \alpha$$

$$h \frac{\partial^3 \alpha}{\partial \eta^3} = \dots \quad h \frac{\partial^3 \alpha}{\partial \eta^2 \partial \zeta} = \dots \quad h \frac{\partial^3 \alpha}{\partial \eta \partial \zeta^2} = \dots \quad h \frac{\partial^3 \alpha}{\partial \zeta^3} = \dots$$

$$\frac{\partial^2 h}{\partial \eta^2} = \dots, \quad \frac{\partial^2 h}{\partial \eta \partial \zeta} = \dots \quad \frac{\partial^2 h}{\partial \zeta^2} = \dots,$$

$$\frac{\partial h_1}{\partial \zeta} = \dots \quad \frac{\partial h_1}{\partial \eta} = \dots$$

ktp, ktp.

Poste la samo donas ĉe f kaj g_1 :

$$(1 - \zeta) \frac{\partial f}{\partial \eta} = - \sin \alpha \frac{\partial \alpha}{\partial \eta}, \quad (1 - \zeta) \frac{\partial f}{\partial \zeta} = f - 1 - \sin \alpha \frac{\partial \alpha}{\partial \zeta},$$

$$(1 - \zeta) \frac{\partial^2 f}{\partial \eta^2} = - \sin \alpha \frac{\partial^2 \alpha}{\partial \eta^2} - \cos \alpha \left(\frac{\partial \alpha}{\partial \eta} \right)^2$$

$$(1 - \zeta) \frac{\partial^2 f}{\partial \eta \partial \zeta} = \frac{\partial f}{\partial \eta} - \sin \alpha \frac{\partial^2 f}{\partial \eta \partial \zeta} - \cos \alpha \frac{\partial \alpha}{\partial \eta} \frac{\partial \alpha}{\partial \zeta},$$

$$(1 - \zeta) \frac{\partial^2 f}{\partial \zeta^2} = 2 \frac{\partial \alpha}{\partial \zeta} - \sin \alpha \frac{\partial^2 \alpha}{\partial \zeta^2} - \cos \alpha \left(\frac{\partial \alpha}{\partial \zeta} \right)^2,$$

$$(1 - \zeta) \frac{\partial^3 f}{\partial \eta^3} = \dots \quad (1 - \zeta) \frac{\partial^3 f}{\partial \eta^2 \partial \zeta} = \dots$$

$$(1 - \zeta) \frac{\partial^3 f}{\partial \eta \partial \zeta^2} = \dots \quad (1 - \zeta) \frac{\partial^3 f}{\partial \zeta^3} = \dots$$

$$\begin{aligned}\frac{\partial g_1}{\partial \eta} &= 1 - \cos \alpha + k \frac{\partial \alpha}{\partial \eta}, & \frac{\partial g_1}{\partial \zeta} &= k \frac{\partial \alpha}{\partial \zeta}, \\ k &= \cos \alpha + \eta \sin \alpha, \\ \frac{\partial^2 g_1}{\partial \eta^2} &= k \frac{\partial^2 \alpha}{\partial \eta^2} + \left(\sin \alpha + \frac{\partial k}{\partial \eta} \right) \frac{\partial \alpha}{\partial \eta}, \\ \frac{\partial^2 g_1}{\partial \eta \partial \zeta} &= k \frac{\partial^2 \alpha}{\partial \eta \partial \zeta} + \frac{\partial k}{\partial \eta} \frac{\partial \alpha}{\partial \zeta}, & \frac{\partial^2 g_1}{\partial \zeta^2} &= k \frac{\partial^2 \alpha}{\partial \zeta^2} + \frac{\partial k}{\partial \zeta} \frac{\partial \alpha}{\partial \zeta}, \\ \frac{\partial k}{\partial \eta} &= k_1 \frac{\partial \alpha}{\partial \eta} + \sin \alpha, & \frac{\partial k}{\partial \zeta} &= k_1 \frac{\partial \alpha}{\partial \zeta}, \\ k_1 &= \eta \cos \alpha - \sin \alpha, \\ \frac{\partial^3 g_1}{\partial \eta^3} &= \dots, & \frac{\partial^3 g_1}{\partial \eta^2 \partial \zeta} &= \dots \\ \frac{\partial^3 g_1}{\partial \eta \partial \zeta^2} &= \dots, & \frac{\partial^3 g_1}{\partial \zeta^3} &= \dots \\ \frac{\partial^2 k}{\partial \eta^2} &= \dots, & \frac{\partial^2 k}{\partial \eta \partial \zeta} &= \dots, & \frac{\partial^2 k}{\partial \zeta^2} &= \dots \\ \frac{\partial k_1}{\partial \eta} &= \dots, & \frac{\partial k_1}{\partial \zeta} &= \dots, & \text{ktp., ktp.}\end{aligned}$$

Post enigo de $\eta=0$, $\zeta=0$ eu ĉi tiuj esprimoj kaj post uzo de la signoj

$$\alpha_\eta = \left(\frac{\partial \alpha}{\partial \eta} \right)_0, \quad p_{\eta\eta} = \left(\frac{\partial^2 p}{\partial \eta^2} \right)_0, \quad q_{\eta\zeta\zeta} = \left(\frac{\partial^3 q}{\partial \eta \partial \zeta^2} \right)_0, \quad \text{ktp.},$$

oni trovas sinsekve la „nulajn“ valorojn:

$$x_0 = M = \frac{t-t_0}{a\sqrt{a}}, \quad h_0 = 1, \quad \alpha_\eta = -1 + \cos M,$$

$$\alpha_\zeta = \sin M, \quad h_{1,0} = 0, \quad h_\eta = \sin M, \quad h_\zeta = -\cos M,$$

$$x_{\eta\eta} = 2 \sin M (1 - \cos M),$$

$$x_{\eta\zeta} = \cos 2M - \cos M = -(1 - \cos M) (1 + 2 \cos M),$$

$$x_{\zeta\zeta} = \sin 2M, \quad h_{\eta\eta} = -2 \cos (1 - \cos M),$$

$$h_{\eta\zeta} = \sin M (2 \cos M - 1), \quad h_{\zeta\zeta} = 2 \sin^2 M,$$

$$x_{\eta\eta\eta} = -3 (1 - \cos M)^2 (2 + 3 \cos M),$$

$$x_{\eta\eta\zeta} = \sin M (1 - \cos M) (1 + 9 \cos M),$$

$$x_{\eta\zeta\zeta} = (1 - \cos M) (2 - 5 \cos M - 9 \cos^2 M),$$

$$x_{\zeta\zeta\zeta} = 3 \sin M (2 \cos^2 M - \sin^2 M), \quad \text{ktp.}$$

Surbaze de la „nulaj“ valoroj, la supraj derivoj de f, g_1 donos al ni la seriojn (denove skribita η_1 anstataŭ η):

$$\begin{aligned}(3, 7) \quad 1-f &= (1 - \cos M) [1 - \eta_1 \sin M + \zeta (2 \cos M) + \\ &+ \frac{1}{2} \eta_1^2 (1 - \cos M) (2 + 3 \cos M) - \\ &- \eta_1 \zeta \sin M (2 + 3 \cos M) + \\ &+ \frac{1}{2} \zeta^2 (4 + 5 \cos M + 3 \cos^2 M) + \\ &+ \frac{1}{6} \eta_1^3 \sin M (1 - \cos M) (5 + 16 \cos M) +\end{aligned}$$

$$\begin{aligned}&+ \frac{1}{2} \eta_1^2 \zeta (1 - \cos M) (2 + 17 \cos M + 16 \cos^2 M) - \\ &- \frac{1}{2} \eta_1 \zeta^2 \sin M (1 + 13 \cos M + 16 \cos^2 M) + \\ &+ \frac{1}{6} \zeta^3 (8 + 11 \cos M + 25 \cos^2 M + 16 \cos^3 M)] + \\ &+ \dots\end{aligned}$$

$$\begin{aligned}(3, 8) \quad \frac{g}{a\sqrt{a}} &= \sin M + \eta_1 (1 - \cos M)^2 + \zeta \sin M \cos M - \\ &- \frac{3}{2} \eta_1^2 \sin M (1 - \cos M)^2 - \\ &- \eta_1 \zeta (1 - \cos M) (\cos 2M - \sin^2 M) + \\ &+ \frac{1}{2} \zeta^2 \sin M (2 \cos^2 M - \sin^2 M) + \\ &+ \frac{1}{3} \eta_1^3 (1 - \cos M)^2 (6 + 2 \cos M - \\ &- 8 \cos^2 M) - \frac{1}{2} \eta_1^2 \zeta \sin M (1 - \cos M) \cdot \\ &\cdot (4 + 5 \cos M - 14 \cos^2 M) + \\ &+ \frac{1}{2} \eta_1 \zeta^2 (1 - \cos M) (2 + 12 \cos M - \\ &- 4 \cos^2 M - 16 \cos^3 M) + \\ &+ \frac{1}{3} \zeta^3 \sin M \cos M (8 \cos^2 M - 5) + \dots\end{aligned}$$

4) Preskaŭparabola moviĝo

En kazo de preskaŭparabola moviĝo estas bezonata la ĝenerale modifita Keplera ekvacio, ĉar tiam en la Keplera ekvacio oni povas havi kaj realajn kaj nereajajn solvojn, en la modifita — nur realajn solvojn. Krome en la pure parabola kazo la modifita ekvacio reduktiĝas al la ekvacio de Barker, t. e. al tio kio nature venas en la integrad—procedo.

Tiam por eltrovo de f, g ni povas utiligi la ekvaciaron (1,27), (1,28), respektive

$$(4, 1) \quad y = \varepsilon - \eta p - \zeta q, \quad \varepsilon = \frac{t-t_0}{r\sqrt{r}},$$

$$p = \frac{1 - \cos \alpha}{1 - \zeta}, \quad q = \frac{y}{1 - \zeta} \left(1 - \frac{\sin \alpha}{\alpha} \right),$$

$$(4, 2) \quad f = 1 - p, \quad g = (\varepsilon - q) r \sqrt{r} = t - t_v - qr\sqrt{r}, \\ \alpha = y\sqrt{1 - \zeta}.$$

Ju pli proksima al 1 estas ζ , t. e. la moviĝo pli proksima al la parabola, des malpli da peno ni havos por grandaj t , ĉar tiam α estas malgranda, malgraŭ la grandaj y . Tial eblas sukcese utiligi la ekvaciaron (4,1) por ĉiuj tempintervaloj dum komet—moviĝo laŭlonge de elipsa aŭ hiperbola orbito ne-

multe devianta de la parabola, kaj havi ĉiam realajn solvojn. Se la moviĝo ne estas parabolproksima, sed pure elipsa aŭ pure hiperbola, tiam oni ankaŭ ne bezonas la ĝeneralan ekvacion, ĉar estas pli simple labori kun la koncerna specialigita ekvacio.

Ankaŭ por la parabolproksima moviĝo, kiel ni havis por la elipsa kazo, ni povas seriigi la esprimojn por f , g . La serioj estos des pli konverĝaj ju malpli la moviĝo devias de parabolo (resp. de cirklo ĉe elipsa moviĝo). Por la seriigo oni devas fari konvenan elekton de la kvantoj je kies gradoj oni seriigos, tian elekton ke la seriigo kaj la trovataj serioj ne estu tro komplikaj.

Konsidere ke ĉi tie ζ proksimas al 1, $1-\zeta$ estas malgranda kaj ni prenu ĝin por unu el etaj kvantoj, malgraŭ tio ke en la formuloj aperas senevite $\sqrt{1-\zeta}$ (fakte la radikoj aperas nur formale en la funkcioj c_2, c_3). Por la dua eta kvanto estas nature preni la kvanton η , kiu estas malgranda malproksime de la perihelio (kaj ĉe la preskaŭparabola moviĝo aliloke oni ja ne povas observi la kometon).

Do ni signu

$$(4,4) \quad \zeta = 1 - \sigma, \quad \alpha = y\sqrt{\sigma},$$

kaj ni trovu unue derivojn de la esprimoj (1,26), respektive

$$(4,5) \quad m = \frac{\sin \alpha}{\sqrt{\sigma}}, \quad p = \frac{1 - \cos \alpha}{\sigma}, \quad q = \frac{\alpha - \sin \alpha}{\sigma\sqrt{\sigma}}.$$

Tuj ni trovas

$$(4,6) \quad \begin{cases} \frac{\partial m}{\partial \eta} = \cos \alpha \cdot \frac{\partial y}{\partial \eta}, & \frac{\partial p}{\partial \eta} = m \frac{\partial y}{\partial \eta}, & \frac{\partial q}{\partial \eta} = p \frac{\partial y}{\partial \eta}, \\ \frac{\partial m}{\partial \sigma} = \cos \alpha \left(\frac{\partial y}{\partial \sigma} + \frac{y}{2\sigma} \right) - \frac{m}{2\sigma} = \cos \alpha \frac{\partial y}{\partial \sigma} - m_1, \\ \frac{\partial p}{\partial \sigma} = m \left(\frac{\partial y}{\partial \sigma} + \frac{y}{2\sigma} \right) - \frac{1 - \cos \alpha}{\sigma^2} = m \frac{\partial y}{\partial \sigma} - p_1, \\ \frac{\partial q}{\partial \sigma} = p \frac{\partial y}{\partial \sigma} - q_1, \end{cases}$$

$$(4,7) \quad \text{kie} \quad m_1 = \frac{m - y \cos \alpha}{2\sigma}, \quad p_1 = \frac{2p - my}{2\sigma}, \quad q_1 = \frac{3q - py}{2\sigma}.$$

En derivoj de p , q ni havas ĵus la bezonajn derivojn de $1-f$ kaj de $\varepsilon = \frac{g}{r\sqrt{r}}$; por trovi ilin mankas la derivoj de y , kiujn ni trovos el (4, 1), nome

$$\frac{\partial y}{\partial \eta} (1 + \eta m + \zeta p) + p = 0,$$

$$\frac{\partial y}{\partial \sigma} (1 + \eta m + \zeta p) + \eta p_1 + \zeta q_1 + q = 0,$$

$$(4,8) \quad \text{aŭ} \quad w \frac{\partial y}{\partial \eta} = -p, \quad w \frac{\partial y}{\partial \sigma} = w_1,$$

kun

$$(4,9) \quad w = 1 + \eta m + \zeta p, \quad w_1 = q + \eta p_1 + \zeta q_1.$$

Pro plujaj derivoj eliminu $\frac{\partial y}{\partial \eta}$, $\frac{\partial y}{\partial \sigma}$ el (4,6)

kaj (4,8) kaj tio donos

$$(4,10) \quad \begin{cases} w \frac{\partial m}{\partial \eta} = -p \cos \alpha, & w \frac{\partial m}{\partial \sigma} = \cos \alpha \cdot w_1 - m_1 w \\ w \frac{\partial p}{\partial \eta} = -mp, & w \frac{\partial p}{\partial \sigma} = mw_1 - p_1 w \\ w \frac{\partial q}{\partial \eta} = -p^2, & w \frac{\partial q}{\partial \sigma} = pw_1 - q_1 w. \end{cases}$$

Daŭrigante la derivadon oni trovas

$$(4,11) \quad w \frac{\partial^2 p}{\partial \eta^2} = [2m^2 p w + p^2 \cos \alpha (1 + \zeta p) - \zeta m^2 p^2] w^{-2},$$

$$w \frac{\partial^2 p}{\partial \eta \partial \sigma} = \left[mp^2 + p \frac{\partial m}{\partial \sigma} (1 + \zeta p) + m \frac{\partial p}{\partial \sigma} (1 + \eta m) \right] w^{-1},$$

$$w \frac{\partial^2 p}{\partial \sigma^2} = - \left(\frac{\partial p}{\partial \sigma} + p_1 \right) \left(\eta \frac{\partial m}{\partial \sigma} + \zeta \frac{\partial p}{\partial \sigma} - p \right) +$$

$$+ \frac{\partial m}{\partial \sigma} w_1 - \left(1 + \zeta p \right) \frac{\partial p_1}{\partial \sigma} + m \left(\zeta \frac{\partial q_1}{\partial \sigma} - q_1 + \frac{\partial q}{\partial \sigma} \right);$$

$$w \frac{\partial^2 q}{\partial \eta^2} = (3mw - \eta p \cos \alpha - \zeta mp) p^2 w^{-2},$$

$$w \frac{\partial^2 q}{\partial \eta \partial \sigma} = -p \left[p^2 - \eta p \frac{\partial m}{\partial \sigma} + \frac{\partial p}{\partial \sigma} (2w - \zeta p) \right] w^{-1},$$

$$w \frac{\partial^2 q}{\partial \sigma^2} = - \frac{\partial q}{\partial \sigma} \left(\eta \frac{\partial m}{\partial \sigma} + \zeta \frac{\partial p}{\partial \sigma} - 2p \right) + \frac{\partial p}{\partial \sigma} \left(\eta p_1 + q \right) - \frac{\partial q_1}{\partial \sigma} (1 + \eta m) + p \eta \frac{\partial p_1}{\partial \sigma} - q_1 \eta \frac{\partial m}{\partial \sigma}.$$

Oni bezonas ĉi tie, sekve de (4,7) kaj (4,10), utiligi

$$(4,12) \quad \begin{cases} w \frac{\partial p_1}{\partial \sigma} = \frac{1}{2\sigma} (2mw_1 - 2p_1 w - mw_1 - y \cos \alpha w_1 + \\ + ym_1 w - 2p_1 w) = m_1 w_1 - wp_2, \\ w \frac{\partial q_1}{\partial \sigma} = \frac{1}{2\sigma} (3pw_1 - 3q_1 w - mw_1 y + yp_1 w - \\ - pw_1 - 2q_1 w) = p_1 w_1 - wq_2, \end{cases}$$

kun la signaĵoj

$$(4,13) \quad p_2 = \frac{4p_1 - ym_1}{2\sigma} = \frac{y^2 \sin \alpha - 5my + 8p}{4\sigma^2},$$

$$q_2 = \frac{5q_1 - yp_1}{2\sigma} = \frac{y^2 m - 7py + 15q}{4\sigma}.$$

La triaj derivoj estos

$$(4,14): w \frac{\partial^3 p}{\partial \eta^3} = -2 \frac{\partial^2 p}{\partial \eta^2} \left(m + \eta \frac{\partial m}{\partial \eta} + \zeta \frac{\partial p}{\partial \eta} \right) - \\ - \frac{\partial p}{\partial \eta} \left(2 \frac{\partial m}{\partial \eta} + \eta \frac{\partial^2 m}{\partial \eta^2} + \zeta \frac{\partial^2 p}{\partial \eta^2} \right) - m \frac{\partial^2 p}{\partial \eta^2} - \\ - 2 \frac{\partial p}{\partial \eta} \frac{\partial m}{\partial \eta} - p \frac{\partial^2 m}{\partial \eta^2},$$

$$w^3 \frac{\partial^3 p}{\partial \eta^2 \partial \sigma} = \dots \quad w^2 \frac{\partial^3 p}{\partial \eta \partial \sigma^2} = \dots \quad w \frac{\partial^3 p}{\partial \sigma^3} = \dots$$

$$(4,15): w \frac{\partial^3 q}{\partial \eta^3} = \dots \quad w^3 \frac{\partial^3 q}{\partial \eta^3 \partial \sigma} = \dots$$

$$w \frac{\partial^3 q}{\partial \eta \partial \sigma^2} = \dots, \quad w \frac{\partial^3 q}{\partial \sigma^3} = \dots$$

Por kalkuli ilin ni bezonos

$$(4,16) \left\{ \begin{aligned} w \frac{\partial^2 m}{\partial \sigma^2} &= - \left(m_1 + \frac{\partial m}{\partial \sigma} \right) \left(\eta \frac{\partial m}{\partial \sigma} + \zeta \frac{\partial p}{\partial \sigma} - p \right) - \\ &- m w_1 \left(\sigma \frac{\partial y}{\partial \sigma} + \frac{y}{2} \right) + \cos \alpha \left(\eta \frac{\partial p_1}{\partial \sigma} + \zeta \frac{\partial q_1}{\partial \sigma} - \right. \\ &- \left. q_1 + \frac{\partial q}{\partial \sigma} \right) - w \frac{\partial m_1}{\partial \sigma}, \\ w \frac{\partial m_1}{\partial \sigma} &= \frac{1}{2} m y w_1 - m_2 w, \end{aligned} \right.$$

$$(4,17) m_2 = \frac{3 m_1 - \frac{1}{2} y^2 m}{2 \sigma} = \frac{3 m - y^2 m \sigma - 3 y \cos \alpha}{4 \sigma^2};$$

$$(4,18) \left\{ \begin{aligned} w \frac{\partial^2 p_1}{\partial \sigma^2} &= - \left(p_2 + \frac{\partial p_1}{\partial \sigma} \right) \left(\eta \frac{\partial m}{\partial \sigma} + \zeta \frac{\partial p}{\partial \sigma} - p \right) + \\ &+ w_1 \frac{\partial m_1}{\partial \sigma} + m_1 \left(\eta \frac{\partial p_1}{\partial \sigma} + \zeta \frac{\partial q_1}{\partial \sigma} - q_1 + \frac{\partial q}{\partial \sigma} \right) - \\ &- w \frac{\partial p_2}{\partial \sigma}, \\ w \frac{\partial^2 q_1}{\partial \sigma^2} &= - \left(q_2 + \frac{\partial q_1}{\partial \sigma} \right) \left(\eta \frac{\partial m}{\partial \sigma} + \zeta \frac{\partial p}{\partial \sigma} - p \right) + \\ &+ w_1 \frac{\partial p_1}{\partial \sigma} + p_1 \left(\eta \frac{\partial p_1}{\partial \sigma} + \zeta \frac{\partial q_1}{\partial \sigma} - q_1 + \frac{\partial q}{\partial \sigma} \right) - \\ &- w \frac{\partial q_2}{\partial \sigma}. \end{aligned} \right.$$

En la lastaj derivoj estas utiligitaj (4,12), (4,16), sed ni bezonas ankoraŭ — el (4,13) kaj (4,17) — :

$$(4,19) \left\{ \begin{aligned} w \frac{\partial p_2}{\partial \sigma} &= m_2 w_1 - p_3 w, \\ w \frac{\partial q_2}{\partial \sigma} &= p_2 w_1 - q_3 w, \end{aligned} \right.$$

$$(4,20) \quad p_3 = \frac{6 p_2 - y m_2}{2 \sigma}, \quad q_3 = \frac{7 q_2 - y p_2}{2 \sigma}.$$

Stariĝu ĉe la triaj derivoj (la vojo restas la sama, sed la kalkuloj ĉiam pli komplikaj). Por trovi la seriojn f , g ni devas trovi la „nulajn valorojn”, t. e. la valorojn kiujn oni havas preninte $\eta = 0$, $\sigma = 0$. Unue ni havas y_0 el (4,1), sekve el

$$(4,21) \quad y_0 + \frac{1}{6} y_0^3 = \varepsilon = \frac{t - t_0}{r \sqrt{r}}.$$

Post tio (4,5) tuj donas

$$(4,22) \quad m_0 = y_0, \quad p_0 = \frac{1}{2} y_0^2 = y_1, \quad q_0 = \frac{1}{3!} y_0^3 = y_2,$$

kie pro mallongeco estas signita

$$(4,23) \quad y_{i-1} = \frac{1}{i!} y_0^i.$$

Same mallonge la nulajn valorojn de la derivoj

$\frac{\partial y}{\partial \eta}$, $\frac{\partial y}{\partial \sigma}$ ktp. signu y_η , y_σ , ..., do

$$(4,24) \quad y_\eta = \left(\frac{\partial y}{\partial \eta} \right)_0, \quad p_{\eta\eta} = \left(\frac{\partial^2 p}{\partial \eta^2} \right)_0, \\ p_{\eta\sigma} = \left(\frac{\partial^2 p}{\partial \eta \partial \sigma} \right)_0, \quad q_{\sigma\sigma} = \left(\frac{\partial^2 q}{\partial \sigma^2} \right)_0, \dots$$

La limvalorojn (4,7), kiam $\sigma \rightarrow 0$, ni povas trovi ĉu senpere (unue espriminte ilin eksplice) ĉu per apliko de la regulo de *L'Hospital*, ligite kun la valoroj (4,6), ekz.

